

04

Dieto, fastado, varmaj terapioj, oksigenoterapio

Havi kontraŭbruluman dieton estas kerna por bonstato ĝenerale, sed eĉ pli dum malsano. Kontraŭbruluma signifas tradiciajn dietojn sen prilaboritaj manĝaĵoj, sen aldonitaj grasoj kaj sukeroj, kaj hejm-kuiritan manĝojn riĉaj je buntaj legomoj kaj fruktoj, kun altkvalitaj proteinoj, grasoj kaj oleoj. Informoj pri tio estas facile haveblaj de multnombraj interretaj fontoj. Lastatempe ĝi ankaŭ fariĝis ofta scio, ke intermita fastado, kie la periodo por manĝado estas reduktita ideale al 6-8h ĉiutage, ebligas al la korpo regeneriĝi kaj ripariĝi, kion ĝi ne povas kiam manĝaĵo estas konsumata la tutan tagon kaj malfrue en la nokto. Nokto estas la ĝusta tempo por resaniĝo, do malfruaj matenmanĝoj kaj fruaj vespermanĝoj helpas, kun nenio intere. Varmoterapio kiel saŭnoj kaj varmaj banoj kun bansaloj ankaŭ estas konsiderataj helpemaj por elimino la spike-proteinojn. Alia kontraŭbruluma kuracado estas hiperbara oksigenoterapio, uzata sukcese dum jardekoj en kondiĉoj kun altaj niveloj de brulumo.

La 10 plej efikaj maltoksigaj

- Vitamino D
- Vitamino C
- NAC (N-acetilcisteino)
- Ivermektino
- Semo de Nigella sativa
- Kverketino
- Zinko
- Magnesio
- Kurkumino
- Lakta kardo

La 10 plej bonaj detoksaj gvidiloj

- AAPS Covid Guide
- AFLD Treatments
- FLCCC iRecover Post Vaccine
- FLCCC Long Covid
- LEF respiratory/immune
- Orthomolecular Protocol
- Zelenko Protocol
- Lessenich Protocol
- Yanuck & Pizzorno Integrative
- WCH Spike Protein Full Guide

Malgarantio. Ĉar Covid-19-infektoj, vakcinoj de Covid-19 kaj la problemoj pri spico-proteina damaĝo estas novaj, ĉi tiu gvidilo estis informita per plej avantaĝaj kaj emergantaj medicinaj esploradoj kaj la klinika sperto de internaciaj kuracistoj kaj holismaj sanaj praktikantoj; ĝi evoluos kiel Nova eksperimentaj rezultoj ekaperos, bonvolu kontroli regule por ĝisdatigoj. Ĝi estas nur por edukado: bonvolu raportu al kuracisto laŭ via elekto se vi sentas vin malbonfarta kaj atribuas ĝin al la viruso aŭ al vakcino. Nepatentitaj liberaj medikamentoj kaj suplementoj sugestitaj povas havi malsaman haveblecon laŭ la landoj de la mondo. La pliaj gvidistoj ĉi tie listigitaj estas la respondeco de la medicinaj profesiuloj elsendintaj ilin.

Resume pri maltoksigo el la proteinoj "spike" por la malsanoj estigitaj de Longdaŭra Kovimo kaj de la vakcinoj pri la Kovimo-19

"Ĉi tiu resume celas esti gvidilo por rapida agado cele al malpezigi inflamajn devenojn de "spikopatio", malsano asociita kun troo da proteino spike (proteino de pinto) en la korpo. Por multe pli longa versio ekzamenanta la aferojn profunde, bonvolu viziti: worldcouncilforhealth.org."

Dr Tess Lawrie, MBBCh, PhD



Enkonduko

La vakcinoj kontraŭ Covid-19 konsistas en nova, ankoraŭ neprovita, drogteĥnologio, kiu celas programi la ĉelojn en niaj korpoj por fari spike-proteinojn, kiu siavice supozeble provokas imunreagon por protekti la korpon kontraŭ la viruso. Ni nun scias, tamen, ke tio kreas multajn brulumojn kaj koagulojn tra histoj kaj organoj de la korpo pro ĉi tiuj troaj proteinoj induktitaj de vakcinoj. Brulumo povas esti pli malbona inter homoj jam malsanaj, aŭ kun dispozicioj, inter infanoj aŭ bonfartantaj junuloj, kiuj havas tre potencajn imunreagojn. La produktado de spike-proteino fare de ĉiu ĉelo fakte povas konduki al la imunsistemo ataki sian propran korpon. Japana studo trovis, ke vakcinaj eroj amasiĝas en la hepato, la osta medolo kaj la ovaroj. Multaj eksperimentaj rezultoj sugestas ke la spike-proteino povas trairi la sangon barilon en la cerbo, produktante neŭrologiajn kromefikojn. Ĉi tio aldoniĝas al la pruvoj, kiuj sugestas, ke homoj suferas de multaj sangaj koagulaĵoj, miocardito, koratakoj, neŭrologiaj misfunkcioj, malbonaj efikoj en la reprodukta sistemo, gastrointestaj misfunkcioj, prionaj malsanoj (encefalito) kaj multaj aliaj simptomoj.



La kvar ĉefaj aliroj por "spikopatio"

Estas kvar terenoj, kiuj utilas por la homoj serĉantaj redukti brulumon kaj cirkuladon de spike-proteinojn en siaj korpoj. Homoj povas uzi ajnan kombinaĵon el la jenaj metodoj laŭ la rezultoj plej helpemaj, per individua eksperimentado, depende de kiu korpa sistemo ŝajnas plej trafita kaj de kiaj san-konsiloj ili ricevis de la san-profesiulo laŭ sia elekto.

1. Farmaciaj drogoj en libera vendo aŭ kiel preskribajn kuracilojn
2. Vitaminoj, mineraloj kaj aliaj profesiaj suplementoj
3. Herbaj kuraciloj kaj tizanoj
4. Dieto, fastado, varmaj terapioj, oksigenoterapio

01

Farmaciaj drogoj en libera vendo aŭ kiel preskribajn kuracilojn

Surbaze de la klinika sperto de sanprofesiuloj tutmondscale, ni povas disvastigi al vi, ke la ĉi sekvaj medicinaj intervenoj montris pozitivan efikon ambaŭ sur la Kovim-19 kaj la vakcina malsano de Kovim-19. La terapiaj meĥanismoj varias : de interveno je la nivelo ligado de la spike - proteino je viaj ACE2-riceviloj (ACE2 = enzimo pri konvertigo de angiotensino 2), ĉesado de eksternorma sangado aŭ koagulado, al redukto de brulumo, enmiksiĝo sine de la virusaj replikaj meĥanismoj. La drogoj estas uzataj ĉe diversaj stadioj de la malsano, laŭ takso de sanprofesiulo.

- Ivermektino (kun zinko)
- Hidroksiklorokino (kun azitromicino kaj zinko)
- Kortikosteroidoj
- Kontraŭhistaminoj
- Aspirino
- Malalta dozo da naltreksono
- Aliaj intervenoj, inkluzive de kolĉikino kaj de ozono kaj kloro-dioksida kuracadoj

02

Vitaminoj, mineraloj kaj aliaj profesiaj suplementoj

luj vitaminoj, mineraloj kaj aliaj suplementoj estas esencaj por resaniĝi de "spikopatio". Profesikvalitaj multivitaminaĵoj kaj mineraloj povas doni ĝeneralan subtenon, sed pli celita kuraca aliro inkluzivas erojn ne ĉiam trovitajn en multivitaminaĵoj kaj mineraloj aŭ en sufiĉaj niveloj por resanigo de modera ĝis grava brulumo. Tio inkluzivas altajn dozojn da vitamino D kaj C, da vitamino K2, da N-acetilcisteino, da glutationo, da melatonino, da kverketino, da emodino, ekstrakto de kultivata nigelo (Nigella sativa), da resveratrolo, da kurkumo, da magnezio, da zinko, da nattokinazo, da fiŝoleo, da zeolito, kaj da aktivigita karbo.

03

Herbaj kuraciloj kaj tizanoj

La herba medicino disponigas jarmilmaljunan kornon de abundeco por la homa sano. Unuj vegetaĵoj disponigas ŝikimikan acidon, kiu neŭtraligas la spikan proteinojn kaj ankaŭ ĉesigas formadon de koaguliĝoj, kiel infuzoj el nadloj de pinoj, el fenkolo, el stelanizo, ekstrakto de hiperiko, kaj la folioj de simfito. Aliaj aromaj herboj, spicoj kaj tizanoj havas ĝeneralajn kontraŭvirusajn, kontraŭ-bakteriajn kaj kontraŭbrulumajn efikojn, ekzemple Prunella vulgaris, kurkumo, verda teo, nigra teo, ekstrakto de lakta-kardo, ekstrakto de Azadirachta indica, cinamo, kardamono, muskato, florburĝonoj de kariofilo, koriandro, zingibro, ajlo, oregano, majorano, rosmareno, timiano, olibano, andrografiso, radikoj kaj folioj de leontodo, propolis.

NB Gravedaj kaj mamnutrantaj virinoj, tiombone ĉiu ajn glutanta farmaciaj drogojn devus peti pri pliaj konsiloj kaj kontoli ĉu la koncerna kuracilo estas konvena en ĝia kazo. Estas rekomendita al ĉiu konsulti fidindan san-profesiulon.